

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 44-a BRAZILIO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2020 N-ro 180

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.

ELDONEJO LORENZ: 45 JAROJ!

KARAJ GEFRATOJ, GESAMIDEANOJ!

Ĉe la fino de ĉi-jaro (24/12), kiam ni atingos 45 jarojn de fruktdona semado, ni povas komenci ĉi-artikoleon per la ŝaĝaj vortoj de Renato Corsetti: "Eldonejo Lorenz estas unu el la plej grandaj Esperanto-agantoj, vera kolono de nia kulturo" (Almanako Lorenz 2020).

Fakte, Renato pravas kiam tion mencias, ĉar la riĉeco de Esperantujo estas ties kultura diverseco: religio, filozofio, arto, scienco, k.a., kaj ĉiuj sin respektante kiel instruis Jesuo, Zamenhof, Allan Kardec kaj diversaj aliaj pacigantoj de la homaro.

Eldonejo Lorenz, faka asocio de UEA pri Spiritismo, kiel diris Renato, vere estas kolono de nia e-movado, same kiel Oomoto, Ateismo, Budhismo, Filatelismo, Ĵurnalismo, Mormonismo kaj diversaj aliaj respektindaj e-Institucioj. Tio vere estas la animo de Esperantujo, kune kun ties Interna Ideo, ideo de paco kaj frateco Inter ĉiuj homoj.

Ni trankvile povas aserti, ke Eldonejo Lorenz perfekte plenumis sian taskon en 2020, malgraŭ la ĉi-jara pandemio: ni eldonis la tradician "Almanakon Lorenz" (2020), kun verkistoj el diversaj landoj,

religioj, filozofioj kaj ankaŭ sen religio, montrante la neŭtralecon de nia Jarlibro. Ankaŭ ni eldonis, en Esperanto, la mirindan libron de Allan Kardec, "Postmortaj verkoj".

Ni pliatentigas, ke niaj libroj, "Almanako Lorenz" kaj la trimonata bulteno "Komunikoj", ni ilin sendas, tute senpage, al pli ol 100 landoj! Inkluzive, se vi volos ilin ricevi, skribu al ni: editora_lorenz@uol.com.br.

Nome de la Estraro kaj konsilantaro de nia Eldonejo, ni volas tutkore danki al ĉiuj amikoj, kunlaborantoj kaj anoj de Lorenz. Se vi ne estas ano de nia Asocio, petu informojn kaj, kun granda ĝojo, ni ilin sciigos al vi.

"Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante,
cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
Ni semas kaj semas konstante."

(Zamenhof)

La Estraro
Eldonejo Lorenz



Eldonejo Lorenz omaĝas Jarmila Růžnarová (Ĉehio)

ŝi!

Jen la lastaj vortoj de nia fratino en la Almanako de la Jubileo de Lorenz koncerne la temon "Amikeco":

Pri la amikeco estas konata ankaŭ bela kanto, kiu nomiĝas "La letero", de kiu mi transskribas la unuan strofon:

Al vi povas mi ĉion diri, kion havas mi en kor'.
La sincera amikeco inter ni estas trezor',
kiun gardu ni zorgeme, eĉ dum jaroj flugas for.
Kaj pro via fideleco restos vi en la memor'.
Bonamiko, restu gaja kaj feliĉa en sanec'!
Kaj ni kune levu glason je honor' de l'amikec'!
(Jarmila)

Koran dankon, Jarmila, pro via amikeco! Restu en paco!
Ĝis baldaŭ!

Eldonejo Lorenz,
La Estraro



Noto de la redakcio: se vi volos ricevi la pdf-an version de Almanako Lorenz, kun la intervjuo de Jarmila, kun granda ĝojo ni ĝin sendos al vi. Ankaŭ, se vi volos, ni sendos al vi la Almanakon de Jubileo, kie estas la tre bela artikolo de Jarmila pri "Amikeco".



JARMILA, NIA SINCERA OMAĜO!

Nia fratino elkarniĝis la 5-an de decembro 2020.

Kion diri pri tiu, kiu la tutan vivon laboris por belaj aferoj, precipe por Esperanto? Energia esperantistino kiu, humile, laboradis ĝis la fino de la vivo. Ni memoras, ke dum multaj jaroj ŝi sendadis siajn belajn kontribuojn, verajn perlojn por nia jarlibro, "Almanako Lorenz". Ŝi estis unu el la intervjuitaj de nia Almanako. Jarmila ĉiam estis preta kunlabori. Ŝi neniam rifuzis inviton por verki. Kiam nia Eldonejo atingis 40 jarojn, ni skribis al ŝi kaj proponis diversajn temojn, kaj la de ŝi elektita estis "Amikeco"! Inkluzive, du monatoj antaŭ la forpaso de nia samideanino, ŝi sendis al ni belan neeldonitan kronikon, kiun ni aperigos en Almanako Lorenz 2021.

Jarmila estis sincera amikino kaj gardis geamikojn en la tuta mondo.

Ni ne devas malĝojiĝi pro la elkarniĝo de nia fratino, ĉar ŝi perfekte plenumis sian mision tersurface, perfekta disĉiplino de Zamenhof, vera homaranino, amikino de ni ĉiuj! Ni ne ĝin perdis. Jarmila vivas! Jarmila ĉiam loĝos en la fundo de niaj koroj. Ni dubon ne havas: baldaŭ ni renkontiĝos kun

LORENZ

"KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 44-a – n-ro 180 | Oktobro-Novembro-December 2020

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: ☎ + 55-21-98485-4539
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>
Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br | Fejsbuko: **Editora Lorenz**



Kompostita de Rogério Mota

AMIKOJ DE LORENZ

LÍCIO DE ALMEIDA CASTRO (1942)

LA EMERITA PEDIATRO Lício de Almeida Castro fariĝis prezidanto de BEL por du oficperiodoj. Unue li estis elektita la 19an de julio 2001, en Braziljo, okaze de la 37a Brazilia Kongreso de Esperanto. Li okupis la prezidantecon de 2001 ĝis 2004.

Lício revenis al prezidanteco de BEL kelkajn jarojn poste. Li estis elektita por la oficperiodo 2010/2013, en Campo Grande-MS, okaze de la 48a BKE.

Kiel la unua paŝo, la estraro, gvidita de Lício, entreprenis enketon por elekti la pli favoran kongresan monaton, laŭ decido de la Ĝenerala Asembleo, en Campo Grande. Ĉu julio? Ĉu januaro? Plejparte el la voĉdonantoj elektis la monaton januaro. Tial la 47-a BKE jam okazis en januaro, en Taguatinga-DF (2012).

Notinde estas, ke, sub la gvidado de Lício, BEL eldonis la revuon Brazilia Esperantisto tre regule, seninterrompe. En tiu periodo, BEL publikigis ankaŭ tri verkojn, nome "La vidvino", "Neforgeseblaj skribaĵoj de Ismael Gomes Braga" kaj "Ni lernu kun Porto Carreiro Neto".

Lício naskiĝis en Belém, ŝtato Pará, la 3an de septembro 1942. Li estis stenografisto en la Supera Tribunalo de Pará. Lia patro kaj liaj gefratoj ankaŭ estis stenografistoj.

Li diplomiĝis pri medicino ĉe la Federacia Universitato de Pará, en 1967. Poste li faris kurson



dum tri jaroj ĉe Hospitalo Jesuo, en la kvartalo Vila Izabel, Rio-de-Janeiro, por fariĝi fakulo pri Pediatrio.

Kiel pediatro, Lício laboradis ĉe la Federacia Senato, ĉe la Regiona Hospitalo de Gama (satelita urbo de Federacia Distrikto) kaj ĉe la Supera Labortribunalo.

Li esperantistiĝis en 1989, kiam li faris bazan kurson pere de "Cseh - metodo", kaj partoprenis du Universalajn Kongresojn, en Montpellier, Francio (1998), kaj en Fortaleza, Brazilo (2002). En la 1a de februaro 1998, Lício fariĝis prezidanto de Braziljo Esperanto-Asocio. Li estas Cseh- instruisto, diplomita de Internacia Esperanto-Instituto (IEI), kies sidejo situas en Haia, Nederlando.

Lício estis respondeculo pri Esperanto-kursoj ĉe Brazilia Spiritisma Federacio, en Braziljo. Li instruis nian karan lingvon ĉe aliaj spiritismaj domoj kaj ĉe Akademio de Civila Polico.

Lício edziĝis al Rosinete Reis Ferreria Castro kaj ili havis du gefilojn: Cristiano kaj Rafaela.

D-ro Lício loĝas en la ĉefurbo de Brazilo ekde 1973.

La spiritisto Lício ofte prelegas pri spiritismaj temoj en spiritismaj institucioj.

(Kunlaboris Eurípedes Barbosa)

Francisco Cândido Xavier | Emmanuel

Se ni faris eraron, ni ĝin mem korektu, sincere sriparante ties sekvojn; sed se plenumita devo al ni certigas trankvilecon de konscienco, kiam provoko de la tenebro spitas nin, ni estu kuraĝaj kaj donu nenian atenton al malbono nek kvitancon al ajna perturba konto, kiun ofendo aŭ klaĉo volas prezenti al ni.

Se erramos, retifiquemos nós mesmos, reparando, com sinceridade, as consequências de nossas faltas; no entanto, se a obrigação cumprida nos garante a consciência tranquila, quando a provocação das trevas nos desafie, tenhamos a coragem de não conferir ao mal atenção alguma, abstenendo-nos de passar recibo em qualquer conta perturbadora que a injúria ou a maledicência nos queiram apresentar.

Libro *Encontro marcado*, FEB Eldonejo

Ĉap. 49, Em paz de consciência



Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



I. Al Espero 11. (23.) IV. 1892

Al sro D-y.

En la tempo, kiam estis verkata la "Dua Libro", la demando, ĉu oni devas diri "estas varme" aŭ "ĝi estas varma" ne estis ankoraŭ absolute decidita kaj la uzado de unu formo estis egale bona, kiel la uzado de la dua. Nun tiu ĉi demando iom post iom per la uzado akceptis jam decidon pli difinitan. La adjektivo difinas la substantivon aŭ la pronomon havantan sencon de substantivo (responde la demandon "kia") kaj la adverbo difinas la verbon (responde la demandon "kiel"). Tial ni diras: "la vetero estas bona", "li kantas bone". Tamen en la okazoj, kie la difino apartenas precize nek al substantivo aŭ pronomo, nek al verbo, ni ofte ne povas decide diri, kian demandon ("kia" aŭ "kiel") nia difino devas respondi kaj kian formon ni devas uzi. En ĉiu alia lingvo tiu ĉi duba demando estas decidata per la sankcio de l' uzado, - en nia lingvo ni konsilas uzadi en tiuj okazoj ĉiam la adverbos; ekzemple: "estas varme", "estas vere", "ĝi estas vere" (sed se la difinata "ĝi" havas la sencon de substantivo, ĝi kompreneble devas esti uzata kun adjektivo; ekzemple: "lia parolo estas mallonga, sed ĝi estas tre konvinka"). Cetere la vorton "ĝi" ni konsilas ĉiam uzi nur en tiu ĉi lasta senco, t. e. nur por anstataŭi objekton aŭ aferon (kiel "li" anstataŭas personon); sed en esprimoj senpersonaj kaj senobjektaj ni konsilas neniam uzi la vorton "gi" (ekzemple "hodiaŭ estas varme" kaj ne "hodiaŭ ĝi estas varme"); tiam la duboj en la uzado de la adjektivo aŭ adverbo per si mem defalos.

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

VERKOJ

Aymoré Vaz Pinto

MI PENSAS, ke scienco estas por ĉiuj, tiel kiel literaturo, muziko kaj pentrarto. Tio signifas ke kiam sciencisto komunikas la rezultojn de siaj eksperimentoj, li devas celi la bonon kaj la progreson de la homaro. Sammaniere la literatura verkisto devas esprimi siajn sentojn cele al la kreo de bonaj impulsoj en la legantoj. Tiel same devas agi muzikistoj kaj pentristoj,

Klarigo – sciencistoj inventis nek la konojn kiuj ilin apogas nek la naturajn leĝojn kiuj evidentiĝas en la eksperimento. Aŭtoroj inventis nek la ABC-n, nek la grafikan sistemon. Muzikistoj inventis nek la muzikajn notojn, nek la muzikajn ilojn. Pentristoj inventis nek farbon nek tolaĵon.

Ĉiuj ni estas heredantoj de niaj antaŭuloj. Do, se ni deziras verki, ni zorgu, por ke scienco kontribuu por la evoluo kaj plibonigo de la homa vivkondiĉo, ke aŭtoro estu ilo, kiu esprimas noblajn sentojn, ke muziko estu agrabla kaj rava kaj ke pentraĵo plibonigu la bildon de la vivo.



Francisco Cândido Xavier | Emmanuel

Kion la homo devas ne forgesi, en ĉiuj sencoj kaj cirkonstancoj de la vivo, tio estas la preĝo de laboro kaj sindono en la sanktejo de ekzistado el purigaj luktoj, ĉar Jesuo benos liajn farojn plenumitajn per sincera penado.

Do livro *Palavras de Emmanuel*, FEB Editora
Capítulo 40, Trabalho



Kristnasko

– Kristnaska Fabelo

(Harang Csendül)

Endre Ady (1877-1919)



I

Turo tondras,
Kantoj sonas,
zumas foren dankokantoj.
En la kara vilaĝeto
Je Kristnasko
pentofaras la kredantoj.

Hom' ĉitempe,
amoplene,
surgenue petpreĝetas.
En la kara vilaĝeto
la Mesio
al estonto espervekas.

Longavice
altempliĝe
junaj, oldaj homoj paŝas
en la kara vilaĝeto,
dankopreĝo
al la ama Dio pasas.

Kvazaŭ, sube
dia pure
sankta graco flustrus, flugus,
en la kara vilaĝeto
ĉiukore
nune, nur la amo lumus.

II

Premas min la granda urba
bruo kruda,
Bone estus la soleno
miahejma.
Bone estus purakore
-kiel foje-
dankemiĝi,
bona estus senpremiĝi.

Bone estus, povi:
tutforgesi.
Bone estus: ludadanta
bebo esti.
Per infana kredo, koro,
pri la mondo
repaciĝi,
pace, ame beatiĝi.

III

Tiu ĉi fabelo
se estiĝus kredo,
vere granda ĝojo
flugus al la mondo.
La falema homo
estus ree homo,
talizman' lin savus,
estus bona homo.

Nia tera vojo
estus ne Golgoto,
regus unu volo
en la granda mondo.
En la religio
gravus nure tio:
Dio havu gloron,
homo amu homon...
Kristnaska fabelo
se reala iĝus
ĝojo por eterno
en la mond' estiĝus.

(Esperantigita de Adrienne Pásztor)



ENDRE ADY estis unu el la plej grandaj hungaraj poetoj. Li naskiĝis la 22-an de novembro 1877 en komunumo Érmindszent, hodiaŭ Adyfalva (rumana nomo: Ady Endre), kaj mortis en Budapeŝto la 27-an de januaro 1919. Li estis la pli aĝa frato de Lajos Ady.



Jen Fanfaranulo vila
Nur ruliĝas sur la planko;
Ĝi ludas ĉiam trankvila:
Ĝin ĝenas neniam manko.

KDE SIA NASKIĜO tiu kateto estis tre delikata. Ĝi estis ja buleto...kun plej blanka felo. Kun plej infaneca rigardo, ĝiaj serĉemaj okuletoj penadis esplori ĉi tiun novan mondeton en sia hejmo. Ĝi serĉadis lanfadenan bulon por ludi kaj ruliĝi. Por ruliĝi kaj salti. Kaj ĝi saltadis kaj kuradis, ridetadis kaj ludadis.

Plurfoje ĝi soifis, kaj kiam ĝi malsatis, ĝi tuj serĉadis sian kruĉeton, sian poteton, en kiuj ĉiam estis freŝa akvo, kaj kie la manĝoporcio neniam mankis.

En pluvaj tagoj, ju pli la lito invitis, des pli ĝi serĉis la komforton de la sofo, de kie li povis rigardi eksteren, tra la fenestro, la falantajn pluvogutojn kaj la batadon de la vento.

Unu tagon, la kateto vidis, scivole, tra la pluvaj ventopuŝoj, hundon tremantan de malvarmo. Tiu triste malsupren rigardis. El ties feloj gutadis pluveroj, kaj ties vosto pendadis malsupren kaj ties ledo tremadis.

La kateto vidis, ke ĝi serĉadis ian lokon, kie ĝi sin protektus, ĉar ĝi aflikte penadis liberiĝi de la vento, kiu ĝin multe suferigis. La hundo

kuntiriĝis en angulo, kiu povus malpliigi ĝian suferadon.

— Ho vi ho! Kion vi faras ĉi tie? Kial vi tiel multe tremas?

Kaj, suspekteme, la hundo, ne kredante, pro la banala demando, senatente respondis:

— Mi tremas, ĉar mi sentas malvarmon. Kiom multe la pluvo malsekigas, mia kateto! Ĉu vi ne scias?

— Ne! Kion signifas tio?

Ne konsiderante la scivolemon de la katinfano, la hundo daŭrigas:

— Kaj plie: mi ankaŭ malsatas. Ĉu vi scias, kion signifas tio?

— Ĉu malsato? Mi ja scias! Kiam mia ventreto komencas ronki, tiam mi sentas malsaton.

— Kaj kion vi faras, kiam vi malsatas?

— Nu, mi manĝas! Mia ujeto ĉiam estas plena.

— Kaj kiam ĝi ne estas plena?

— Ĝi ja estas ĉiam plena! Ho! ju pli multe mi manĝas, des pli multe mia ujeto pleniĝas. Sufiĉas, ke mi volas. Mi havas multe da manĝaĵo. Kaj mi manĝas kaj iras dormi en mia liteto!

— Kaj tiel, mia kateto, ĉu vi tute ne scias, kio estas ne havi lokon, kie oni povas ripozi?



— Ekzistas neniŭ, kiu ne havas sian liteton. Ekzistas neniŭ, kiu ne havas nutraĵon por manĝi aŭ iomete da akvo por trinki.

— Mia infano, kion vi diras? Ĉu vi ne scias, ke ekzistas tiel multe da hundoj kaj katoj, kiuj ne havas propran hejmon? Nu, ĉu vi ne scias, ke ekzistas tiaj estuloj, kiuj ne havas mastron? Tiaj estuloj, kiuj senĉese soifas kaj malsatas? Nu, ĉu vi havas nenian ideon pri tiuj, kiuj vagadas tra la mondo, sen loĝejo, sen hejmo?

— Nu, mi ne kredas. Ĉiuj havas sian mastron. Estas ja neniŭ, kiu ne havas domon, aŭ akvon, aŭ bongustan nutraĵon por manĝi antaŭ ol kuŝiĝi en sian liteton!

Kaj la hundo, rapide rezignante konversacii, forlasas sian angulon kaj foriras, ne atentante la kateton. Kaj la kateto, tute ne kredema, moke ridetante, oscedas kaj eksaltas el la sofo. Post gluto de delica freŝa akvo, ĝi iras al la lito kaj denove oscedas kaj trankvile ekdormas.

Kaj tia estas la afero, amiketoj miaj: kio okazas en la mondo de la bestoj, tio sama okazas en la mondo de la homoj!

Ekzistas homoj — kvazaŭaj infanoj dotitaj per komprenemo — kiuj ne kredas, ke ekzistas io diferenca de tio, kio estas de la mondo, kie ili vivas.

Ili ne kredas al la homoj, kiam ĉi tiuj diras: — Mi suferas — kaj ili ne komprenas, kiam tiuj ĉi tremas de malvarmo aŭ de timo.

Tiuj homoj, amiketoj, estas pli kompatindaj ol ĉiuj malriĉuloj de la mondo.

Atentante kaj sentante ĝin, ni konu la suferadon de niaj gefratoj. Ili ja travivas tion, ĉar ili bezonas, kaj ni povos helpi, kiam ni volos favordoni niajn korojn. Atentu, infanoj, vian ĉirkaŭan mondon, por ke vi povu helpi.

Simpla amika rideto
Aŭ kolegara ludado,
Certe plaĉas al amiko

Kun la sufera degrado.

Ho, povra Fanfaranulo.
Ĝia viv' estas trezor';
Nutraĵ' abundas al ĝi,
Al ĝi tamen mankas kor'!

Dank'al Dio



Spirito: Antônio Francisco

Mediumo: Manuel Francisco

El la portugala lingvo tradukis: Benedicto Silva

Kunlaboris: João Ângelo

KUNLABORU!

KUNLABORU! – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!



ARTO DE VIVO EN PAROJ

Zbigniew Galor* (Pollando)

En la duobla mondo,
Materia – spirita,
Vivo iĝis la arto
Al paroj dediĉita.

Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar.
Ĝuste la du — amata par'!
Ĝuste la du — amata par'!

Dialektika principo:
Eternaj "pro" kaj "kontraŭ",
Ĝemela la duopo.
Unu kaj unu, ne "aŭ".

Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar.
Ĝuste la du — amata par'!
Ĝuste la du — amata par'!

Vivi en paro kun vi,
Ne sole, ne en grupo.
Ne, ne amase — des pli.
Nur vi kaj mi sen dubo.

Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar.
Ĝuste la du — amata par'!
Ĝuste la du — amata par'!

Estu al mi por la par'
Kiel mankanta ŝuo,
Aŭ trovita gant'.
Silento post la bruoj.

Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar.
Ĝuste la du — amata par'!
Ĝuste la du — amata par'!

Ni — paroj el albumoj,
Lerneĵ', geedzoj, gepatr'.
Duope, sed sciantaj,
Ke ĝis tri foje la art'.

Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar.
Ĝuste la du — amata par'!
Ĝuste la du — amata par'!

Manko pro kruela sort':
Ŝi sen li aŭ li sen ŝi.
Ĉiam iu en duopo kun mort'.
Neniam sen paro restas mi.

Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar.
Ĝuste la du — amata par'!
Ĝuste la du — kaduka par'!

*Forpasinta la 27-an de januaro 2017.
El Almanako Lorenz 2019



KUN LA TRADUKO DE la hungara karmemora samideano Szabadi Tibor J. (elkarniĝinta la 27-an de Novembro 2020) kaj la kunlaboro de la brazila ano de Eldonejo Lorenz, Saulo Salgado Wanderley, kun granda ĝojo ni lanĉas en la hungara lingvo, la mirindan verkon de la Spirito Andreo Ludoviko, per la mediumeco de Francisco Cândido Xavier, A küldöttek (La senditoj).


Se vi volos scii aliajn detalojn, skribu al ni:
editora_lorenz@uol.com.br

SZABADI TIBOR, hungara esperantisto kaj spiritisto, tradukisto de diversaj spiritismaj verkoj, elkarniĝis la 27-an de Novembro. La lasta verko tradukita de Tibor estis la supre menciita verko Aküldöttek.



Al nia kara frato kaj samideano Tibor, nian koran dankon, kaj al lia familio, nian sinceran senton!

Ĝis baldaŭ, kara frato!



ĈI-LIBRO TEMAS pri kolekto da gravaj tekstoj postlasitaj de Allan Kardec, Kodiginto de Spiritismo, kaj ĝi estas dividita en du partoj. En la unua estas pritraktitaj interalie tiaj temoj kiel: spiritisma kredkonfeso rezonata; karaktero kaj religiaj sekvoj de la manifestiĝoj de la Spiritoj; studo pri la naturo de la Kristo; pereiga influado de la materiismaj ideoj; kolektivaj kulpelpagoj; egoismo kaj fiero; libereco,

egaleco, frateco. La dua enhavas registrojn pri la spiritisma iniciĝo de Allan Kardec; lia misio sur la Tero; mesaĝoj de la Spirito de Vero kaj aliaj respektindaj Spiritoj; la aŭtodafeo de Barcelono; la misiista vojiro de la Kodiginto, krom ankaŭ ia "elmontro de motivoj", prezentita en la "Konstitucio de Spiritismo" kiel postlasaĵo de la liona majstro al la estontaj spiritismaj societoj.

Se la eksterbrazilaj samideanoj volos ĝin ricevi, senpage, petu kaj vi ĝin ricevos:

editora_lorenz@uol.com.br

NI REKOMENDAS

JEN MIA VOLUMO HUNGARLINGVA (el la Hungara Elektra Biblioteko). Duaparte ĝi enhavas fabelojn hungarigitajn por la plej junaj hungaraj legantoj (La titolo estas: La malnova ĝardeno) A régi kert: Mesék / Páztorné Földi Adrienne; szerkesztő Bakos József

A hálózatos verzió megnyitása

Jen la titolpaĝo de la verko, kaj la atingejo:
<https://mek.oszk.hu/21400/21443>

Elkore Adrienne Páztor el urbo Miskolc, Hungarujo



“**E**l tiom da diversaj opinioj, la sola, kiu restas neskuebla, estas, ke estas pli bone ricevi ol fari malĵustaĵojn, kaj ke antaŭ ĉiuj aferoj oni devas klopodi ne por ŝajni virta homo, sed esti virta homo.”

(Interparolado de Sokrato en la malliberejo kun siaj disĉiploj)



SENPAGAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al

editora_lorenz@uol.com.br

AL LA SUFERANTOJ

AL VI, HO MIAJ FRATOJ kaj fratinoj en humaneco, al vi ĉiuj, kurbigitaj sub la vivoŝarĝo kaj afliktitaj de pezaj luktoj, angoroj kaj elprovado, mi ja dediĉas ĉi tiujn paĝojn. Mi ilin verkis, celante ja vin, afliktitojn kaj neniohavulojn de tiu ĉi mondo. Humila batalanto por la vero kaj la progreso, mi metis en ilin la fruktojn de miaj maldormadoj, pripensoj kaj esperoj, ĉion, kio min konsolis kaj subtenis dum mia surtera irado.

Dio volu, ke en ili vi trovu utilajn instruojn, iom da lumo por prilumi al vi la vojon. Povu ĉi tiu modesta verko esti por via malĝoja spirito tio sama, kiel ombro por sunbruligita laborulo, kiel fresa, klara fonto por soifa vojaĝanto en seka dezerto!



Se vi volos ricevi, tute senpage, ĉi-verkon en la komforto de via hejmo, kun granda ĝojo ni ĝin sendos al vi. Skribu al: editora_lorenz@uol.com.br



Eufrozina Amélia Guimarães

(1872/1964)



LA FRAŬLINO EUFROZINA AMÉLIA GUIMARÃES, plej konata kiel Zizinha Guimarães, naskiĝis la 26an de decembro 1872 en Laranjeiras, ŝtato Sergipe, kaj forpasis en la sama urbo la 1an de decembro 1964.

Ŝi estis publika instruistino kaj en 1904 fondis la lernejon Escola Laranjeirense en Laranjeiras. En tiu lernejo ŝi instruis Esperanton kiel regula lernobjekto. Zizinha Guimarães komencis lerni Esperanton en 1907. En Laranjeiras ekzistas Escola Estadual Zizinha Guimarães kaj busto en publika placo, justaj omaĝoj al tiu eminenta edukistino.

La revuo *Brazila Esperantisto*, eldono de januaro/marto 1918, publikigis jenan noton:

“En Laranjeiras, nia samideanino prof. Zizinha Guimarães instruadas en sia lernejo dek kvin gelernantoj pri nia lingvo.”

Fervora katolikino, afabla, eleganta, inteligenta kaj talenta muzikistino, Zizinha Guimarães estis modelo de persistemo kaj kuraĝo, kiu alfrontis malfavorajn kondiĉojn. Oni devas konsideri, ke, en la komenco de la 20a jarcento, la virinoj estis viktimoj de antaŭjuĝoj kaj havis malmulte da ŝancoj por lerni kaj labori ekster la hejmo. Krome, Zizinha estis nigrulino kaj oni scias, ke ankoraŭ nuntempe la nigruloj bedaŭrinde suferas antaŭjuĝon.

Ŝi ludis la muzikajn instrumentojn orgeno kaj harmoniumo, ĉefe en festoj okazintaj en “Escola Laranjeirense”.

En la Federacia Universitato de Sergipe, ĉe kurso de muzeologio (2011), Livia Rodrigues Santana prezentis monografion pri Eufrozina Amélia Guimarães. Tio montras, ke Eufrozina estis grava homo en la edukada historio de Sergipe.

Eurípedes Alves Barbosa